

Mèng Hàorán,

## Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda*

De l' montoj ora lumo nun  
 foriĝas en vespera pac'.  
 Ekestas trema bild' de l' lun'  
 sur de l' lageto la surfac'.  
 Kun loza kap-hararo mi  
 sur la teraso kuŝas nun,  
 kvietas mia vivo, ĝi  
 sin donas al la lum' de l' lun'.  
 Flariĝas melilot-odor',  
 ĝi lante supreniĝas al  
 la dom' dum la vespera hor',  
 susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de MÈNG HÀORÁN (\*689 – †740) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)*

*Mi, Manfred Retzlaff, espernantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred\\_Hausmann](http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann). La subtitolo "Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda" signifas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo "Nanting", sopiras je sia amiko Xinda.*